

## Du najbaraj universitatoj en Lausanne Radioprelego de D-ro Arthur Baur, SRI 91-020-A-2

Vi aŭdas prelegon de D-ro Arthur Baur. Legas Heidi Baur.

Ni parolis lastan semajnon pri nova speco de tramo, tiel nomita malpeza metroo, kiu ĵus inaŭguriĝis en Lausanne kaj mi klarigis ke tiu nova kaj tre efika transportilo antaŭ ĉio estis necesa por ligi du ekscentrajn universitatojn al la centro de la urbo. Al ĉi tiuj universitatoj mi dediĉas mian hodiaŭan elsendon. Temas pri la tradicia universitato de Lausanne, kiu apartenas al la kantono Vaŭdo (Vaud), kaj pri la teknika altlernejo, kiu apartenas al la federacio.

La situacio kaj la situo estas iom simila al Zürich. Tiuj estas la solaj svisaj urboj, kiuj posedas samtempe kantonan universitaton kaj federacian teknikan altlernejon. En Zürich ili staras unu apud la alia, centre en la urbo, sed en la lastaj jardekoj la nombro de studentoj kaj de fakoj tiom kreskis, ke ili devis krei satelitojn. La universitato trovis lokon nur 2 kilometrojn for de la centra universitata konstruaĵo. La federacia altlernejo devis translokiĝi iom pli eksteren, al la periferio de la urbo.

En Lausanne same okazis, ke la kresko necesigis translokiĝon, sed tiu elmigrado estis kompleta. En la urbo restis nur la medicina fakultato, ĉar ĝi estas ligita al la hospitalo.

La teknika federacia altlernejo en Zürich malfermiĝis jam 1855, sed la federacia altlernejo en Lausanne nur en 1969. Ĝia historio estas tute alia ol tio de Zürich, kiu dekomence estis federacia fondaĵo. La akademia instruado en Lausanne komenciĝis jam 1537. Tiam estis fondita teologia akademio, kie estis instruataj la estontaj pastroj. Ĉar Vaŭdo aliĝis al la reformacio kaj bezonis reformitajn pastrojn.

Nur en la lasta jarcento la akademio de Lausanne malfermis novajn fakultatojn kaj en 1890 ĝi oficiale povis establiĝi kiel universitato, tiam situanta meze en la urbo. Jam en 1853 kelkaj privatuloj fondis specialan lernejon pri teknikaj sciencoj, kiu komencis sian funkciadon kun ok studentoj. En 1869 tiu speciala lernejo estis aligita al la akademio de Lausanne kiel fakultato de tekniko. Kiam la akademio fariĝis universitato, ĝi kompreneble ankaŭ fariĝis universitata fako. Sed sufiĉe sendependa kaj ĝi ricevis propran nomon Ecole polytechnique d'ingénieurs de l'Université de Lausanne. Mallongigite : EPUL.

En nia jarcento la teknikaj sciencoj enorme evoluis kaj venis la momento kiam la kantono Vaŭdo ekkonis ke ĝi ne plu kapablos financi propran teknikan altlernejon. Tiam la federacio helpis deklarante sin preta transpreni la tutan EPUL kaj donante al ĝi la saman statuson kion jam havis la federacia teknika altlernejo en Zürich. Tio havis la bonvenan sekvon, ke eblas nun trakti germanlingvan kaj franclingvan Svislandon sur egala nivelo. Nun komenciĝis tute nova ĉapitro.

La nova federacia teknika altlernejo bezonis lokon kaj konstruaĵojn. Samtempe la malnova universitato de Lausanne, kvankam liberigita de sia teknika fakultato, devis trovi novan spacon kaj tial elmigri el la centro de la urbo.

Eble mi rapide devas klarigi, kial oni parolas jen pri altlernejo, jen pri universitato. Universitato laŭ la Eŭropa tradicio estas lernejo, kiu okupiĝas pri ĉiuj flankoj de la homa scio.

Altlernejo estas specialigita lernejo, same ankaŭ kiel universitato, sed ne kompleta. Nu, Lausanne estis bonŝanca, nur 5 kilometrojn for de la centro, ĉe la okcidenta periferio de la urbo, sur ebena tero apud la lago oni trovis vastan spacon liberan, kion oni povis akiri kaj tie kreskis en la lastaj dudek jaroj la universitato kaj la altlernejo, ĉiu sur propra tereno sed najbara.

Estas malfacile priskribi kiamaniere realiĝis tiu postulema arkitektura tasko. Temas pri grandaj modernaj konstruaĵoj pli-malpli belaj, sed tre celkonformaj. La altlernejo iom pli kompakte sur la universitata tereno de fakultatoj estas iom pli disigitaj. Ambaŭ institutoj komune konstruis apudan sportan terenon apud la lago. Estas entute ĉarma regiono. Kaj dank'al la nova tramo en 10 minutoj atingebla ekde la centro de la urbo.

La universitato havas la tradiciajn fakultatojn : teologio, juro, sociologio, ekonomio, kemio, fiziko, medicino kaj filozofio, tio estas literaturo, lingvoj, arto. La universitato havas 7400 studentojn, el kiuj 47 procentoj estas inaj. La teknika altlernejo havas 3800 studentojn, el kiuj nur 16 procentoj estas virinoj. La virinoj plej multe ŝatas la tiel nomatajn humanistajn fakojn, kiel lingvoj, literaturo, arto, muziko.

La bela nomo EPUL kompreneble devis malaperi. Ĝi estas anstataŭita per malbela mallongigo EPFL, tio estas Ecole Polytechnique Fédérale Lausanne. La EPFL havas jenajn departamentojn, tie oni ne uzas la vorton fakultato : kemio, fiziko, matematiko, mekaniko, mikrotekniko, elektriĉo, informatiko, konstruĝinĝenierado, agrikulturo, arkitekturo. Oni povas demandi sin, kial certaj fakoj kiel kemio kaj fiziko estas instruataj en ambaŭ lokoj. Tio ankaŭ estas la kazo en Zŭrich. La kaŭzo ŝajnas esti la tradicio, sed tio ne ĝenas. La du najbaraj institutoj tre intensive kunlaboras, disponigas kune duonan milionon ĉiujare por komunaj sciencaj esplortaskoj. La rektoroj plurfoje ĉiujare kunsidas, ili eldonas komunan revuon 'Polyrama'. Kaj la studentaroj ankaŭ kunlaboras, ne nur en sporto.

Lausanne ricevis per tiu novkonstruita kaj ankoraŭ plu konstruata akademia unuo centron de esplorado kaj instruado, kiu estas modela kaj fariĝis fokuso de scienca gravito.

Vi aŭdis prelegon en Esperanto el Svislando. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Arthur BAUR  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*